

UNUA KARESMA DIMANĈO - 9-an de marto 2014

JESUO, FASTINTE DUM KVARDEK TAGOJ, ESTIS TENTATA - Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 4,1-11

En tiu tempo la dia Spirito kondukis Jesuon en la dezerton, por ke la diablo tentu Lin. Dum kvardek tagoj kaj kvardek noktoj Jesuo estis tie ne manĝante kaj ne trinkante, sed fine, Li vere malsatis. Tiam tentanta diablo venis al Li kaj diris: "Se vi estas filo de Dio, ordonu, ke ĉi tiuj ŝtonoj fariĝu panoj". Jesuo respondis: "Estas skribite: Oni ne povas vivi nur per pano, sed ankaŭ per ĉiu vorto kiu venas de Dio".

Tiam, la diablo portis Lin en Jerusalemon, la sanktan urbon, starigis Lin sur la pinto de la templo, kaj poste diris al Li: "Se vi estas filo de Dio, ĵetu vin malsupren, ĉar estas skribite: Al siaj anĝeloj Dio ordonos pri vi, kaj sur la manoj ili vin portos, por ke vi ne stumblu pro iu ŝtono". Jesuo respondis al Li: "Sed estas skribite ankaŭ: Ne tentu la Sinjoron, vian Dion".

La diablo portis Lin ankaŭ sur monton tre altan, kaj montris al Li ĉiujn regnojn de la mondo kaj ilian gloron; poste li diris al Li: "Ĉion, kion vi vidas, mi donos al vi, se vi surgenue adorkliniĝos al mi". Sed Jesuo diris al li: "Foriru, Satano! Ĉar estas skribite: Al la Sinjoro, via Dio, adorkliniĝu, kaj nur Lin servu".

Tiam la diablo forlasis Lin, kaj tuj anĝeloj venis por servi al Li.

La unua karesma dimanĉo malfermiĝas per la evangelio de Mateo kiu prezentas la tentojn de Kristo. Temas pri tri tentoj. La nombro tri signifas tion kio estas kompleta, tion kio estas definitiva. Tio kion nun ni eklegos ne estas epizodo de la vivo de Jesuo, sed la evangeliisto volas komprenigi al ni ke dum la tuta vivo Jesuo estis submetata al tiuj tentoj, aŭ al tiuj allogoj.

Sed ni vidu kion diras la evangeliisto: "*En tiu tempo la dia Spirito kondukis Jesuon en la dezerton, por ke la diablo tentu Lin*". Per la esprimo 'en

tiu tempo' la evangeliisto ligas tiun epizodon al tiu kiu ĝin antaŭas, la bapto de Jesuo, kiam Jesuo ricevis la Spiriton de la Patro, la Patro lin rekonas kiel sian filon, ĉar Jesuo manifestas sian deziron, sian sindevigon lin igi ĉeestanta kiel amo por la homaro. Sekve de tiu sindevigo de Jesuo, la Spirito kondukas Jesuon en la dezerton. La esprimo 'dezerto', memorigas almenaŭ tri aferojn:

- La **eliron**, la liberigon de la popolo disde la egipta sklavigo
- Dum tiu eliro estadis **periodo de tentoj kaj provoj**, al kiuj Dio submetis sian popolon.
- La dezerto estis ankaŭ **la loko kie kolektiĝadis ĉiuj kiuj volis konkuri la povon**, per tumultoj, per ribeloj.

"*Por ke la diablo tentu lin*". La verbo 'tenti' en la evangelio estas aplikata al fariseoj, al sadukeoj, al leĝinstruistoj en la disputado kun Jesuo, kaj Jesuo, al ĉiu el tiuj tentoj, la fariseoj, la sadukeoj, la leĝinstruistoj, respondas per citaĵoj el la Skribo, ĝuste same kiel la evangeliisto ĉi tie antaŭdiras. La vorto 'tento' havas negativan nuancon, reale la diablo – kiel ni vidos – ne tentas Jesuon por ke li faru ion negativan aŭ pekajn agadojn. Nenio el ĉio tio.

La diablo ne prezentiĝas kiel malamiko, kiel rivalo de Jesuo, sed kiel lia aliancano kiu volas lin helpi en la realigado de lia programo. Pro tio, pli ol pri tentoj, ni devus paroli pri allogoj de la diablo. La diablo aperas nur en tiu ĉi epizodo dum la tuta evangelio de Mateo.

"*Post kvardek tagoj kaj kvardek noktoj dum kiuj Jesuo estis tie ne manĝante kaj ne trinkante*" por la evangeliisto gravas substreki ke tiu de Jesuo ne estas la religia fastado kiu utilis por obteni la pardonon kaj la bonvolemon flanke de la Sinjoro. La religia fastado komencadis je sunleviĝo kaj finis je sunsubiro; la fakto ke la evangeliisto substrekas ke li ne manĝis dum kvardek tagoj kaj kvardek noktoj, signifas ke ne temis pri religia fastado.

Temas pri fortoprovo samkiel tiu farita de Moseo antaŭ ol ricevi la tavolojn de la alianco. "*Tiam tentantadiablo venis al Li kaj diris: "Se vi estas filo de Dio"*". La tentanto ne pridubas la dian filecon de Jesuo, kiu en la bapto estis konfirmita de la voĉo de la Patro kiu diris: "Vi estas mia filo", tiu eldiro de la tentanto "Se vi estas filo de Dio" do, ne estas dubo, sed ĝi signifas "pro la fakto ke vi estas filo de Dio", pro la fakto ke vi estas filo de Dio uzu viajn kapablojn je via avantaĝo.

Fakte: "*ordonu, ke ĉi tiuj ŝtonoj fariĝu panoj*". La unua tento estas utiligi proprajn kapablojn por propra avantaĝo. Sed Jesuo ne utiligos proprajn kapablojn por si, sed por la aliaj. Estos Jesuo kiu fariĝos li mem pano por la aliaj. Kaj Jesuo respondas: "*Estas skribite: Oni ne povas vivi nur per pano, sed ankaŭ per ĉiu vorto kiu venas de Dio*".

Ĉi tiuj tri tentoj referencas al tri konataj epizodoj en la libro de la Eliro, tri provoj al kiuj Dio submetis sian popolon en la dezerto, kaj tiuj ĉi estas la provo de la manao. Kion volas diri Jesuo citante tiun ĉi teksto de la libro de

Readmono, ĉapitro 8 versiklo 3? Samkiel la patroj de la dezerto, aŭskultante la vorton, estis satigitaj per la manao, des pli la nova popolo, la nova liberigo de Jesuo, aŭskultante lian vorton, estos satigita.

Jesuo ne faros miraklan geston por satigi sian malsaton, sed lia vorto helpas tiujn kiuj lin akceptas kaj tiujn kiuj lin sekvas kunpartigante la panon kun la malsatantoj.

"Tiam, la diablo portis Lin en la sanktan urbon" tio estas Jerusalemon, *"starigis Lin sur la pinto de la templo"*. Kial tiu detalo? Ĉar en iu apokrifajo, la libro IV de Ezra, oni pensis ke la Mesio, kiun neniu konis, manifestiĝos abrupte aperante sur la plej alta pinto de la templo, sur la pinaklo. Estas do tio la atendo de la popolo. Do la diablo, kiu montriĝas kiel helpanto de Jesuo, diras: "Faru tion kion la popolo atendas, faru tion kion la popolo deziras, eĉ aldonu ion plian!"

Kaj li diras al li la duan fojon: *"Se vi estas la filo de Dio"*, tio estas pro la fakto ke vi estas la filo de Dio, *"ĵetu vin malsupren"*, tio estas montru vin kiel la homoj atendas sur la plej alta pinto de la templo, sed aldonu eksterordinaran fortopruvon kiu komprenigu ke vi estas ververe la filo de Dio. "Ĵetu vin malsupren", kaj poste la diablo citas la psalmon. En tiu kontraŭmeto inter bato kaj rebato pere de skribaĵaj citaĵoj, la evangeliisto volas komprenigi al ni ke ĝuste tio kion li estas rakontanta ne estas iu epizodo, sed dum la tuta vivo Jesuo estos kontrastata de la fariseoj, de la skribistoj, de la maljunuloj, kiuj pensos havi la skribaĵojn je ilia flanko por bloki aŭ haltigi la agadon de Jesuo.

Kaj fakte li citas la psalmon 91, versiklojn 11-12, *"Al siaj anĝeloj li ordonos je via koncerno..."*, tio estas defiu la Sinjoron kaj poste fidu je li.

Tiun tenton ni retrovos poste en la buŝo de la ĉefpastroj, de la skribistoj kaj de la pliaĝuloj, en la momento de la krucigo de Jesuo. *"Se vi estas la filo de Dio"*, pro la fakto ke vi estas la filo de Dio, *"malsupreniru de la kruco"*, tio estas manifestu Dion de povo. Jesuo respondis: *"Estas ankaŭ skribite: Ne elprovu la Sinjoron Dion vian"*.

Ankaŭ tiu estas peco de la skriboj, la libro de Readmono, ĉapitro 6 versiklo 16, kaj ĝi estas la epizodo de Massa, unu el la tentoj de la popolo en la dezerto, kiam la popolo sin demandis: "Sed Jahveo estas inter ni jes aŭ ne?" La popolo do dubis pri la ĉeesto de la Sinjoro. Jesuo havas plenan fidon en la Patro kaj ne sentas la bezonon alvoki eksterordinarajn eksterajn intervenojn kiuj konfirmu tiun fidon.

"Ankaŭ" jen ĉi tie la traduko ne estas preciza, ĉar ĉi tie ĝi diras: *"La diablo portis Lin ankaŭ sur monton tre altan"* neniam li lin portis, do ne povas esti tradukite per 'refoje'. La greka vorto devas esti ĝuste tradukita per 'ĉi foje'. Tiu tento malsamas de la aliaj, la du unuaj ne estis antaŭigataj per la aserto: "Pro la fakto ke vi estas la filo de Dio", se vi estas la filo de Dio, do dank' al la kapabloj kaj al la povo por esti filo de Dio, pro tio la diablo ne entiras la fakton de la dia idaro ĉar ĝi estas tento taŭga por ĉiu homo.

Do *"La diablo portis Lin ankaŭ sur monton tre altan"*. Kial la tre alta monto? En la antikveco la monto estis la rezidejo de la dioj kaj signifis la diecan kondiĉon. La diablo do proponas al Jesuo posedi la diecan kondiĉon. Oni devas memori ke, je tiu epoko, ĉiuj kiuj tenis la povon, havis la diecan kondiĉon. La faraono estis iu Dio, la imperiestro estis filo de Dio. Do ĉiuj kiuj tenis la povon havis la diecan kondiĉon kaj la diablo proponas al Jesuo la diecan kondiĉon. Kiel?

"Montris al Li ĉiujn regnojn de la mondo kaj ilian gloron" tio estas lia riĉaĵo, *"poste li diris al Li: "Ĉion, kion vi vidas, mi donos al vi, se vi surgenue adorkliniĝos al mi"*. Do la diablo proponas al Jesuo la diecan kondiĉon adorante la povon por regi la mondon. *"Sed Jesuo diris al li: "Foriru, Satano!"* Li vokas lin satano, la hebrea nomo. La evangeliisto volas komprenigi ke tiuj estas la tentoj kiuj al Jesuo venas de lia popolo. *"Ĉar estas skribite: Al la Sinjoro, via Dio, adorkliniĝu, kaj nur Lin servu."* Ankaŭ ĉi-foje temas pri citaĵo de la Skribo, el la libro de Readmono, ĉapitro 6, versiklo 13, kie la Sinjoro atentigas sian popolon pri la danĝero de idolkulto enirante en la landon de Kanaan.

Por Jesuo la povo estas idolkulto. Jesuo estas filo de iu Dio amo kiu esprimiĝas pere de la servado, dum la diablo estas bildo de la povo kiu regas la personojn. *"Tiam la diablo forlasis Lin, kaj tuj anĝeloj venis por servi al Li"*.

Jesuo ricevas la protekton de la anĝeloj malakceptante la tenton. Tiuj tentoj de Jesuo, kiel ni diris dekomence, ne estas izolita (unika) epizodo de lia ekzisto, sed la evangeliisto antaŭas por ni ĉion tion kio okazos dum la tuta vivo de Jesuo, daŭre allogata de la preno de la povo, ĉar estis tio kion la popolo atendadis.

Kaj, kiam la popolo rimarkos ke Jesuo ne estas mesio de povo, ĝi lin malakceptos kaj lin mortigos.